

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 7/1981 ★ 5 kr



*Agrablajn  
festotagojn  
kaj ĉion bonan  
en 1982.*

## Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★  
**Telefon:** 08 - 11 74 34 ★  
 EsperantoCentro är öppet måndag — torsdag kl. 17 — 19 ★ **Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet ★  
**Medlemsavgift:** direktansluten medlem 50 kr, ungdomsmedlem under 26 år 25 kr, familjemedlem (utan tidning) 15 kr ★  
 Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften ★  
 Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet ★ **Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 11138 Stockholm ★ **Ansvarig utgivare:** Bertil Åkerberg ★ **Redaktör:** Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, telefon hem 08-712 82 91 ★ **Prenumeration:** 40 kr per år, postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet ★ **Tidningen** utkommer med åtta nummer per år ★ **Fotosats och tryck:** EsperantoCentro, Stockholm 1981

## Esperantoförlaget

**Postadress:** Box 7502, 200 42 Malmö ★ **Besöksadress:** Möllevångsgatan 20 B ★ **Öppettider:** 1 sept — 15 maj; onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18 ★ **Skriftliga beställningar** expedieras hela året, även under sommaren ★ **Telefon:** 040-12 20 29 ★ **Postgiro:** 578-5 ★ **Expedition:** Wivi Nilsson ★ **Styrelsens ordförande:** Anita Lindblom ★ Böcker från utländska förlag beställs hos EsperantoCentro, adress ovan.



Estis juna fraŭlin' en Madrido,  
 kiu preĝis al Dio kun fido.  
 Pri edzo ŝi petis,  
 ĉiun preĝon ripetis,  
 la maljuna fraŭlin' en Madrido.

# JES & ONE



## Beställ 1982-års almanacka!

Nu har 1982-års almanacka, som ser ut som på bilden, kommit! Den är av plast och i samma storlek som på bilden. Hörnen är rundade. Beställ många och ge till dina bekanta!

Almanacksbladen kostar 3,50 vid beställning av enstaka exemplar och 30 kronor för 10 exemplar. Portot är inräknat. Beställ med detsamma från EsperantoCentro, helst genom betalning per postgiro till konto 20 12-3, Esperantoförbundet.

## Femtio kronor för 1982

*La Esperos* prenumeration höjs för 1982 och blir 50 kronor per år. Man prenumererar genom inbetalning till postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Liksom under tidigare år gäller det att gåvoprenumerationer kostar bara hälften, dvs 25 kronor. Man får utnyttja denna förmån bara om man själv prenumererar på tidningen eller är medlem i Esperantoförbundet och får tidningen den vägen. Man får "gåvoprenumerera" för sina vänner utomlands, inte för andra svenskar.

## Bedaŭras la malfruigo

Kelkfoje eĉ la plej zorga planado malsukcesas. Je tiu ĉ tempo de la jaro vi devus esti ricevinta la okan numeron de *La Espero*. La jena numero estas nur la sepa kaj ĝi atingas vin nur dum la lastaj tagoj de la jaro (se la poŝto ne malfruigos ĝin ĝis post la festotagoj).

Okazis, ke mi neplanite kaj nedezirite devis enlitiĝi iam antaŭ la mezo de novembro kaj resti en tiu lito dum absolute tro longa tempo — tempo, dum kiu mi devus finpretigi du numerojn de *La Espero*. La sepa numero tamen finpretiĝis dum 1981; la oka numero atingos vin nur en januaro.

Pro la sama kaŭzo la numero estas malpli dika ol kutime, sed ĝi enhavas la plej gravajn erojn de ordinaraj numeroj. Numero 8 enhavos espereble la kutiman kvanton da paĝoj.

Tar ĉi tiu numero fakte estas la lasta de 1981, mi deziras al vi ĉiuj agrablajn festotagojn.

Franko Luin

## Svenskar och finnar träffades på havet

### INNEHÅLL/ENHAVO

- 118/JES&NE
- 119/Svenskar och finnar  
träffades på havet
- 120/En gammal bekant från  
Västsvrige
- 121/TEMO
- 121/Spertoj el fako pri  
internaciaj vortoj
- 122/Lingvo kaj konflikto: kelkaj  
opinioj
- 123/Fonetika tekniko servas al  
surduloj
- 124/Kelkaj ekzemploj pri frua  
dulingveco
- 125/Marjorie Boulton: Ne nur  
leteroj de plum-amikoj (7)
- 126/Eserpantonytt

★La paĝojn TEMO: LINGVO  
redaktis Ulla Luin.

Det nordiska samarbetet och internordisk vänskap brukar ju vanligen kunna odlas utan att besväras av alltför hinderliga språksvårigheter. Man klarar sig hyggligt med "skandinaviska", men vid umgänget med våra östliga grannar finns dock en nästan oöverstiglig språklig skilljemur. Här vore nog ett gemensamt "brospråk" av nöden.

Det är just vad som nyligen också praktiserats på ett påtagligt sätt, kring mitten av oktober. Närmare 150 esperantokunniga från Sverige och Finland träffades nämligen ombord på Siljalinjens "Skandia" för en gemensam tvådagarskonferens.

Svenskarna hamnade redan från början i minoritet med knappt 30 deltagare, beroende på att alltför kort varsel gått ut från Stockholm.

Esperantisterna från Åbo passade på att fira 20-årsminnet av sin rätt talrika föreningsstiftande — eller kanske riktigare ombildning och förnyelse.

De svenska konferensdeltagarna embarkerade redan på fredagskvällen, och efter ankomsten till Åbo på lördagsmorgonen gick de finska esperantisterna ombord. Sedan rullades de olika programpunkterna upp efter välkomst- och övriga hälsningar. Den sk "nattklubbslokalen" ombord samt (i mån av tillgänglighet mellan måltiderna) fartygets eleganta matsal härbärgerade växelvis arrangemangen, som alla utom ett hölls på det för alla deltagare gemensamma tungomålet, dvs esperanto. Undantaget utgjordes av seminarieläsa Reijo Niemis före-

drag om "Språkundervisning i teori och praktik". Till de svenska deltagarnas hörbara irritation hölls det uteslutande på finska med ytterst kortfattade resuméer på svenska inströdda här och där. Föreläsaren, enligt uppgift visserligen en varm anhängare av esperantos idé, behärskade nämligen inte själv detta språk, och tiden var för knapp för tolkning. Alltså en nog så handgriplig illustration till behovet av ett behändigare, gemensamt kommunikationsmedel.

Men i övrigt flöt programmet fint och utan krångel. För korthetens skull vill meddelaren bland de många punkterna plocka fram endast två, som var på sitt sätt gav en relief av konferensens skiftande innehåll. Den 83-åriga fd rektorn Irja Klemola gjorde en gripande återblick på svenskt-finskt samarbete, som det senaste världskriget bragte åstad i en tung och svår tid för 40 år sedan. En trio av barn i den yngre skolåldern och tillhöriga en estnisk-finsk esperantofamilj knep åhörarnas hjärta med gullig sång på esperanto.

Två utställningar, en av böcker och en av frimärken med esperanto-anknytning, hade ställts i ordning och var tillgängliga för alla färjans ombordvarande passagerare.

På lördagskvällen läde "Skandia" till i Värtahamnen igen. Svenskarna debarkerade och begav sig hem, medan finländarna fortsatte programmet fram emot natten, eller vilade sig inför återkomsten till Åbo på söndagsförmiddagen. **Karl Gustafsson**

# En gammal bekant från Västsverige

Är man kassör i en organisation, så finns det fler tillfällen då man äger pannan i veck och funderar över en utgifts nödvändighet, in sådana då samma panna påverkas av ett leende som sprider sig uppåt från hakspetsen och suddar ut alla bekymmersynkor.

Under sista året har ett par heltäckande leenden orsakats av Agda Olsson. Det har vid varje tillfälle kommenterats av redaktören, så nog om det. Men vem är Agda?

En gammal bekant, faktiskt. Vi träffades redan för tjugotalet år sedan inom västsvenska distriktet, och också då var pengar med i spelet. Det var distriktets kassa som Agda med varm hand lämnade över, sedan hon förvaltat den under några år. Men det var inte det enda uppdraget som Agda fullgjort. Klubben i Göteborg är den organisation där Agda verkat mest, som kassör (förstås) och sekreterare. En och annan läsare vill kanske skjuta in att hon också var omtyckt kursledare under många år. Jovisst var det så. Och när den aktiva tiden blivit till minnen har Agda hittat ett nytt sätt att verka: som donator. Som Agda sa när vi träffades i somras: "Det är det enda sättet jag kan bidra på nu för tiden, arbeta får ni yngre göra."

Under de femtio år som gått sedan hon, troligen 1931, lyssnade på en kollega på socialkontoret, vilken försiktigt propagerade för esperanto, har Agda hunnit uppleva en hel del. 1934 gick den första utlandsresan till Ryssland, sedan har det blivit besök i tjugo länder, till bl a 13 internationella kongresser.

Men helst minns Agda en vanlig charterresa till Teneriffa. Agda kontaktade Regulo Perez där. Det visade sig finnas flera utländska esperantister på ön och man gjorde trevliga utfärder och spontana träffar.

Idag säger Agda att resandet är över, benen har gått långt och protesterar. Sedan ett par år bor hon på Lövgärdets Servicehotell i Angered och kan med glädje notera att en och annan esperantist hittar dit.

Anita Lindblom



PLENA ANALIZA GRAMATIKO  
DE ESPERANTO

Rykande aktuellt  
standardverk. 600 sidor. 140,- kr

SVENSKA FÅGLAR

Ordlista svenska-esperanto,  
esperanto-svenska, plus  
latinska namn. 27 sidor. 15,- kr



KONSULTLIBRO PRI ESPERANTAJ  
BIBLIOTEKOJ KAJ MUZEOJ

Referensbok, tar även upp  
svenska samlingar. 56 sid. 32,- kr

PASPORTA SERVO  
DE TEJO

Gästgäntoj 1981. Adress-  
handbok för resande.  
36 sidor. 25,- kr



LIDJA ZAMENHOF.  
VIVO KAJ AGADO:

av Isaj Dratwer. Ett stycke  
esperantohistoria sedd  
genom LL Zamenhofs dotters  
brev. 112 sidor. 39,- kr

- Sänd din beställning till EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.
- Sätt in vad böckerna kostar på postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet, så slipper du fakturaavgift på 5,- kr.
- I priserna ingår moms och porto. (Reservation för ändring av valutakurser, moms med mera).

Esperantoförlaget



# Spertoj el fako pri internaciaj vortoj

Antaŭ ol oni reorganizis la svedan gimnazion en 1968, oni multe diskutis pri la ekzistorajto de la latino en la leciona horaro. Jam tiam la gravita centro de la latinistudado forŝoviĝis, tiel ke multe da atento estis donata al la pluekzisto de latinaj vortoj en la modernaj lingvoj. Ĉu do la gimnazianoj povus lerni tion sen la teda enkapigo de la latina gramatiko? Se oni diserigas la plej gravajn latinajn vortojn je afiksoj kaj bazoj, studado de la latindevena internacia vortprovizo estas ebla sen atento al la latina lingvo mem. Tiel naskiĝis nova studfako, kiu hava sian lokon en la humanisma kursaro, ampleksante po tri lecionojn en semajno dum la dua studjaro. La fako estas nomata *Allmän språkkunskap*, kio laŭvorte signifas "ĝenerala lingvokono" kaj ne tre adekvate esprimas, pri kio la studado temas. La latino, tamen, ne malaperis, sed la humanistaj lernantoj povas elekti inter ĝi kaj la nova fako. La diferenco de amplekso estas tre granda: la latino postulas po 7 lecionojn en semajno dum du studjaroj. Prak-

tike tio signifas, ke la lernantoj kun speciala intereso pri lingvoj kutime preferas la latinon, dum la ceteraj sin dediĉas al ĝenerala lingvokono. Tiu fako do atingas tre malgrandan nombron el la gimnaziaj lernantoj (ĉirkaŭ 50% el la humanistoj, kiuj siavice reprezentas la plej malgrandan sektion de la gimnazio). Certe oni povas konstati, ke ĝi estas unu el la plej malbone konataj studtemoj en nia lerneja kursaro. Do eble ne estus malkonvene mallonge prezenti ĝin, tiom pli, ke ĝi havas apartan intereson por internacilingvanoj.

## ELLEGÅRD INVENTIS

La "inventinto" de la fako estas Alvar Ellegård, profesoro pri la angla en la universitato de Gotenburgo. Li ankaŭ verkis lernolibron kun la trafa titolo "*De internationella orden*" (La internaciaj vortoj). Komence ekzistis ankaŭ alia lernolibro, "*Allmän språkkunskap*" de sinjoroj Wikén kaj Einarsson, sed ĝi jam ne estas sur la merkato. Estas oportune sekvi la diversajn partojn de la studfako laŭ la enhav-



tabelo de Ellegård. La unua ĉapitraro nomiĝas "Strukturo de la lingvo". Oni studas, kio pruvas parencecon de diversaj lingvoj, kaj lernas pri la hindeŭropa sed ankaŭ pri aliaj gravaj lingvofamilioj. Oni analizas lingvaĵon laŭ fonemoj kaj morfemoj (prefiksoj, bazo, sufiksoj). Grava estas la ĉapitro pri pruntvortoj: kial kaj kiel oni pruntas (aŭ evitas pruntajn) en diversaj lingvoj. La lernantoj konatiĝas kun etimologiaj vortaroj kaj atentigas la kulturhistorian rolon de la fremdvortoj. La dua sekcio havas la titolon "La internacia vortprovizo kaj ĝia konsisto". La enhavo koncentriĝas pri latinaj afiksoj, kiuj estas studataj kun diversaj bazoj. (Iom granda parto de la lernolibro fakte estas bazvortaro, tiel ke la studanto facile povas trovi la signifon de la latinaj bazoj: *vid, viv, volv* ...) Ekzemple, oni kon-





trolas la bazon *port* kaj kombinas ĝin kun la lernitaj prefiksoj: *im/port-* "enporti", *ex/port-* "elporti", *trans/port-* "transporti", *ap/port-* "alporti", *re/port-* "re-, raporti", *de/port-* "forporti", *sup/port-* "subporti, eventuale ankaŭ kun sufikso: *port/abel* "portebla". Aŭ oni kombinas la sufikson *-os-* "-plena, -hava" kun diversaj bazoj: *nerv/os*, *religi/os*, *por/os*, *luxu/os* ... Tre grave estas lerni, kiel tiuj afiksoj traktiĝas en la diversaj lingvoj studataj de la lernanto: la angla (kiu ĉiam estas uzata kiel kontrollingvo, krom la sveda), la franca, la germana kaj eventuale la hispana. Per simpla procedo oni do lernas, ke al angla *-ous* respondas franca *-eux*, germana *-ös* kaj hispana *-oso*; estas facile "transplanti" la saman vorton en iun alian lingvon: *nervous*, *nerveux*, *nervös*, *nervoso* ... Tiel oni

povas pliampleksigi sian vortaron per centoj da vortoj en la studataj lingvoj kaj krome pli bone kompreni la fremdvortojn en la sveda. Kiam la latinaj afiksoj estas pritraktitaj, la sama procedo uziĝas rilate al grekan. Ĝenerale, tamen, la grekaj pruntvortoj havas karakteron pli erudician ol la altinaj, kaj impresas ofte iom specialiste. En la lasta fazo de la studado oni reiras al la latino mem, esplorante ĝiajn formrestaĵojn en la moderna lingvaĵo (*Marie Bebdelsedag*, *Kristi lidande*, *juris doktor*) kaj lernante latinajn esprimojn, kaj frazerojn (*ad notam*, *in absurdum*, *anno Domini*) kaj la plej konatajn sentencojn (*veni, vidi vici*; *de gustibus non est disputandum*). La studentoj instruiĝas pri la latinaj morfologiaĵoj necesaj por kompreni tiujn esprimojn. Ĉio ĉi okazas dum ĉirkaŭ 80 lecionoj.

#### TERENO PROKSIMA AL ESPERANTO

Kiel vi jam komprenis, ni estas tie ĉi sur tereno proksima al tiu de la internaciaj lingvoj. Estas tute nature, ke la lernantoj, vidante la amason de fakte ekzistantaj internaciaj vortoj, sin demandas, kial oni ne eluzas tiun vortprovizon por internacia komunikigo. Wikén & Erlandsson ĝuste konkludis, enmetante en sian lernolibron ĉapitron pri esperanto (kaj interlingua) kun portreto de

Zamenhof. Ellegård nenion diras eksplicite pri internaciaj lingvoj, sed estas tute klare, ke la temo apartenas en la sfero de tiu ĉi fako. Mi ankaŭ scias, ke multaj kolegoj almenaŭ mallonge informas pri artefaritaj lingvoj, kaj mi havis la plezuron en ĵus pasinta oktobro prelegi pri interlingvistiko al instruistoj de *allmän språkkunskap* dum oficiala kursa tago.

#### POZITIVE SED ABSTRAKTE

Do, kia estas la rezulto de tiu novkreitaĵo? Estas ekster dubo, ke la lernantoj pozitive reagis al la nova fako. Ili trovas ĝin utila kaj esenca. La instruistoj eble ne estas same pozitivaj: la studado de vortoj sen tekstoj ĉiam impresas abstrakte, kaj ofte estas malfacile doni agrablan variecon al la lecionoj. Alia grava malhelpo estas la nesufiĉa lernotempo. Tamen la eksperimento sukcesis en pluraj rilatoj kaj eble povas konduki, en pli sistema formo, al valora superrigardo pri la tuteŭropa vortprovizo. Ekde tiu ĉi semestro (aŭtuno 1981) validas nova lernoplano, kiu donas pli da atento al la lingva strukturo kaj ties terminoj kaj malpli al la puraj latinaĵoj. Sed nova gimnazia reformo jam frapas je la pordo, kaj neniu povas ankoraŭ diveni la sorton de la Ellegård-a kreaĵo. Eble ne estos loko por ĝi ...

Ebbe Vilborg

## Lingvo kaj konflikto: kelkaj opinioj

"Paroli la saman lingvon tre valoras kaj la rajto uzi sian gepatran lingvon havas tre grandan signifon por la homo, por la sento, ke oni valoras."

Tiel skribas profesoro Bengt Sigurd en artikolo en la revuo *Språkvård* (nro 2-1981), kiun eldonas la sveda lingvokomitato *Svenska språknämnden*. La artikolo baziĝas sur prelego pri lingvo kaj konflikto, kiun li faris en simpozio pri regionismo, apartismo kaj etna identeco en Lund en 1980. La daŭrigo estas interesa por esperantisto:

"Esti devigata paroli je la

kondiĉoj de alia persono donas malavantaĝon. Oni neniam sentas sin vere komprenata, kiam oni parolas fremdan lingvon, estas malfacile atingi plenan kontakton, ŝerci kaj elturniĝi el ĉiuj situacioj, senti sin vere libera."

Sigurd estas profesoro pri ĝenerala lingvistiko en Lund. Kiel lingvisto, li komencas la artikolon per trarigardo de vortoj kun signifo de konflikto, kaj analizas, kiel oni uzas lingvon anstataŭ armilojn je konfliktoj. Li montras, ke la risko pri miskomprenoj estas pli granda dum

konfliktoj, ne nur pro eraroj, sed ankaŭ pro intenco, aŭ pro tio ke kolerulo parolas pli streĉe kaj rapide por ne doni tro da paroltempo al la kontraŭulo. Akran konflikton oni rekonas per tio, ke la kontraŭuloj eĉ ne plu parolas unu al la alia, aŭ je nivelo de ŝtatoj: rompas la diplomatiajn rilatojn.

Dum konflikto lingvo povas ankaŭ esti maniero rekonii la amikojn. La amikoj eble havas la saman elparolon, dialekton aŭ lingvon. Komuna lingvo kreas solidarecon, dum malsamaj lingvoj kreas malamikecon. Pluraj faktoroj povas plifortigi tiajn tendencojn, ekzemple longa historio de la lingvo, kaj literaturo. En tiu ĉi kunteksto Sigurd mencias, ke lingvoj kiel esperanto havas nenian valoron por nacia solidareco. Lingvo kun

akademio kaj lingvo, kiu estas science pristudata kaj havanta vortarojn, gramatikon kaj skrib-sistemon, estas pli alte taksata, same kiel regione limigita lingvo. Sigurd mencias, ke internacia lingvo kiel la angla signifas malpli kiel simbolo de solidareco.

Fine, Sigurd diskutas la eblecon taksu riskon pri konflikto el

lingvo-vidpunkto. Li prezentas en ses punktoj, ke la risiko estas pli granda, se la lingvoj estas grandaj, bone evoluitaj literaturre kaj science, malsimilaj, geografie apartaj, kaj se samtempe estas diferencoj de politika aŭ ekonomia potenco.

Ulla Luin




## Fonetika tekniko servas al surduloj

La evoluo de scienco kaj tekniko kondukis al tio, ke nuntempe ekzistas aparatoj, kiuj povas paroli. Tiaj aparatoj ne nur redonas parolon en la maniero de, ekzemple, sonbendaparato, sed ili mem formas la parolosonon, simulante homan parolorganon. Ankaŭ jam ekzistas aparatoj, kiuj certgrade povas rekoni parolatajn demandojn, respondojn kaj ordonojn. Tiaj aparatoj kaj aliaj fonetikaj teknikajoj, pri kiuj oni okupiĝas en la Teknika altlernejo de Stokholmo, utilas kiel helpiloj por homoj kun diversspecaj organaj malavantaĝoj, kiel blinduloj, surduloj kaj tiuj kun manka manipulpovo. Jen kelkaj ekzemploj:

Teksto de libro aŭ gazeto antaŭ la presado ordinare ekzistas en kodigita en trubendo aŭ en iu alia formo senpere legebla de komputoro. Per komputora traktado oni plue povas transformi tiun tekston en fonetikan formon taŭgan por direkti parolautomaton. En tia maniero oni povas do aŭtomate produkti parolatajn versiojn de libroj kaj gazetoj, utile por blinduloj. La amplekso de tiucela komputora programo altgrade dependas de la koncerna lingvo. Por finna aŭ esperantlingva teksto ĝi estus multe pli simpla ol por la sveda aŭ angla. Por la sveda aŭ la angla la programo devas enhavi liston de vortoj kun escepta prononco. Tie troviĝas, ekzemple, la informo, ke la sveda "hade" prononciĝas [hadde], kaj ke "kille", "kö" prononciĝas kun [k], kontraŭe al la ĝenerala regulo. Ĉe vortoj kiel "kör" kaj "modern" kun du malsamaj prononcoj kaj

signifoj, tia vortlisto tamen ne sufiĉas por decidi, kaj en la praktiko oni akceptas en tiuj kazoj foje malĝustan prononcon. Ĉar ili ne estas speciale oftaj, tiuj malĝustaj prononcoj ne multe ĝenas. Pli ĝena povas esti la senemocia parolmaniero de la aŭtomato. Ĝi ja mem ne komprenas, kion ĝi diras. Laŭ la prijuĝo de iu blindulo la aŭtomata parolo bone taŭgas, ekzemple, por diskonigoj fare de publikaj instancoj, sed ne por erotikaj



Oscilogramo de sentifona vibrado

rakontoj.

Utilaj por blinduloj estas ankaŭ parolantaj kalkuloj, kiuj jam ekzistas, kaj oni povas atendi, ke baldaŭ ekzistos parolantaj plurlingvaj vortaroj, ĉe kiuj oni per klavaro entajpas vorton, kies tradukon en alian lingvon oni sekve povas aŭdi. Nur iomete pli fore en la estonteco troviĝas la parolanta enciklopedio.

La inversa tasko, nome konstrui aparaton, kiu tajpas tion, kion oni diras, estas malpli facile solvebla. Kontentiga solvo fakte ankoraŭ mankas. Estas ankaŭ tiel, ke oni jam detale scias, kiel la homo produktas la sonojn de

la parolo, dum la konoj pri ilia perceptado ankoraŭ estas rudimentaj. Tial oni ja povas simuli la homan parolorganon, sed ne la homan aŭdadon. Tamen jam ekzistas aparatoj, kiuj povas rekoni kaj distingi inter kelkdek vortoj, aŭ eĉ pli, se la parolanto ĉiam estas la sama. La plej inteligentaj el tiuj aparatoj mem povas adaptiĝi al la voĉo de nova parolanto post iom da aŭskultado. Parolrekonaj aparatoj povas utili unuavice al personoj kun manka manipulpovo pro kriplaj manoj aŭ pli ĝenerala limigo de sia movkapablo. En Belgio oni jam konstruis aŭton stiratan per

la piedoj kaj per parolataj ordonoj. Centprocentan tujan obeemon oni tamen ankoraŭ ne atingis.

Personojn kun kancero en la voĉkordoj oni ofte povas helpi sekure per plena forprenado de ili. Oni devas post tio fermi la interligon inter buŝo kaj spirtubo kaj provizi la pacienton per spira malfermo en la kolo. Post tiu operacio la paciento estas senvoĉa. Kelkaj sukcesas post ekzercado uzi ruktan voĉon, sed per tia oni povas paroli nur malrapide kaj apenaŭ belsone. Por tiuj malavantaĝuloj ekzistas artefaritaj voĉfontoj en formo de vibrilo



tenenda kontraŭ la kolo. Per la malnovaj tipoj de tia vibrilo la voĉo de la parolanto sonas tute monotone, sed nun oni konstruis tiajn, ĉe kiuj oni per variado de manprema forto povas varii la intonacion.

Homoj, kiuj denaske tute ne havas kapablon aŭdi, inter si uzas gestan lingvon. Tio estas ilia natura lingvo. Tiuj surduloj do konsistigas lingvan minoritaton. Por parollingvaj minoritatoj alia parollingvo altrudita al ili tamen ĉiam estas natura. Por surduloj, kontraŭe, parollingvo estas nenatura, ĉar al ili mankas la rimedoj por plene percepti ĝin. Malgraŭ tiu evidenta fakto ĝis antaŭ nelonge en svedaj lernejoj por surduloj la uzo de la gesta lingvo estis malpermesita, kaj daŭre oni sekvas tie la saman ĝeneralan instruplanon kiel en lernejoj por aŭduloj. Laŭ tiu instruplano la sveda estas la unua kaj la angla la dua lingvo. Nun oni ja uzas gestojn, sed ĉefe nur kun samtempa sveda parolado. La rezulta gestumita sveda lingvaĵo fundamente diferencas de la gesta lingvo en sia gramatiko. Oni do fakte daŭre ne rekonas la gestan lingvon kiel la unuan kaj la svedan lingvon kiel la duan lingvon de svedaj surduloj.

Por instrui al surduloj la parollingvon de ilia ĉirkaŭaĵo akompana gestumado estas unu taŭga sed ne sufiĉa rimedo. Por lerni paroli ankaŭ ne sufiĉas rigardi la buŝon de instruisto. En tia maniero oni povas percepti la diferencon, ekzemple, inter [b d g], sed ne tiun inter [t d n]. Aparte malfacile lerneblas la prononco de frikativoj kaj de ĝusta intonacio. Por ebligi al surduloj percepti tiajn trajtojn de la parolo oni konstruis diversspecajn sonvidilojn kaj sonsentilojn. Similaj aparatoj krome

povas utili ankaŭ al surdiĝintoj, kiuj jam posedas parollingvon. La "sentifono", kreita de la subskribinto, ekzemple prezentas al la surduloj la plej gravajn nevideblajn trajtojn de parolsonoĵoj per vibrilo tenata en la mano. Tiu vibrilo vibras malsammaniere por konsonantoj kun malsama artikulmaniero, kiel [t d n s]. Per la sentifono surduloj pli bone povas percepti dirojn ol per nura liplegado. Ĝia utilo limiĝas de la mallonga daŭro de parolsonoĵoj. Ĉe rapida parolo ne plu eblas eluzi la informon prezentitan de

la vibrilo. Cetere: oni ankoraŭ ne plene komprenas, kiel eblas orele percepti la sinsekvon de parolsonoĵoj. Simpla eksperimento montras, ke oni tute ne kapablas ĝuste redoni la sinsekvon de kvar malsamaj neparolaj sonoĵoj, kiuj senpere sekvas unu la alian, kaj kiuj havas la intermezan daŭron de parolsonoĵoj. Por povi ĝuste respondi al la demando pri la sinsekvo de la aŭditaj sonoĵoj, ilia daŭro devas esti pli ol duobligita.

Hartmut Traunmüller

## Kelkaj ekzemploj pri frua dulingveco

"Plep" diris la infano kaj per tio ĝi konfirmis aron da scioj pri infan-lingvistiko. La infano havis la aĝon de preskaŭ jaro kaj duono.

Je la aĝo de 1 — 2 jaroj la plej multaj infanoj eldiras siajn unuajn vortojn. Kelkaj komencas eĉ pli frue, kelkaj pli malfrue.

La unuaj eldiroj de infano estas unuvortaj frazoj. La vorto "plep" ne signifis nur "akvo", sed ankaŭ la senton de kontento, kiam la infano aŭdas la sonon, kiun ŝtoneto faras, kiam ĝi trafas akvon. Alia vorto, "ita" povis signifi "mi finmanĝis" aŭ "fermu la akvokranon" aŭ "la pelvo estas malplena".

La unuaj vortoj de infano povas simili al vortoj, kiujn plenkreskuloj diras (ekzemple

"ita" el "finita"), sed povas ankaŭ esti inventataj de la infano mem. "Plep" evidente ne similas al la sveda "vatten" nek al la esperanta "akvo", kiujn la infano aŭdis.

Por la infano gravas, ke aliaj homoj parolu kun ĝi, stimulu ĝian lingvoevoluo. La infano opiniis, ke estas necese uzi vorton por signi la nocion "akvo", kaj ĝi ankaŭ fidis, ke oni akceptos la malkorektan "plep" kiel indikon pri volo komuniki.

### JAM EN LA UNUA TAGO

Eksperimentoj montris, ke novnaskita infano jam post unu tago moviĝas kiel reago al homa parolo, sed ne sammaniere reagas al izolitaj sonoĵoj el lingvo aŭ al frapetoj.

Sveda profesoro pri infanlingvo, Ragnhild Söderbergh, verkis plurajn tre legindajn librojn aŭ ĉapitrojn en la sveda pri la lingvoevoluo de infanoj. El ampleksa ofta registriĝo de la parolevoluo de kelkaj infanoj ŝi havas interesajn ekzemplojn por ilustrati ne nur la evoluon, sed ankaŭ la diferencojn inter kelkaj infanoj.

### DULINGVA INFANO

Pri la frua evoluo de dulingvaj infanoj ekzistas malmulte da tiaspeca materialo. Eble tio dependas de la fakto, ke dulingveco tiom varias: hejme oni parolas unu lingvon kaj kun aliaj homoj alian lingvon, aŭ la gepatroj uzas unu lingvon inter si kaj alian lingvon al la infano, aŭ la gepa-





troj parolas ĉiu sian lingvon al al infano, aŭ nur unuopa persono parolas alian lingvon, aŭ tute ne estas trovebla sistemo en la lingvouzo. Je kiu aĝo eblas scii, ĉu la infano komprenis, ke diversaj lingvoj ĉirkaŭas ĝin?

Inter la unuaj vortoj de la infano estis "pa" kun la signifo "lampo" (svede "lampa"), kaj "bam" kun la signifo "varma" (svede "varm"). El tio eblas suspekti, ke dulingva infano pli frue lernas vortojn, kiuj similas en ambaŭ lingvoj.

"Ita" estis tre praktika vorto por la infano, farita el la esperanta vorto "finita". Tiun vorton la infano uzis kaj al la patrino, kiu parolas svede al ĝi, kaj al la patro, kiu parolas al ĝi esperanton. Same pri la vorto "tinni", "gazeto" (svede "tidning"), kaj pri multaj aliaj vortoj.

El tio ĉi eblas teoriumi, ke entute la unuvorta periodo ne estas ĉefe periodo de vortolernado, sed de nocio-lernado. Gravas havi etiketon por povi fari klasifikigon, sed ne gravas, ke ĝi simulu al io.

Kelkaj vortoj, kiujn la gepatroj komence ne povis deĉifri, revenis plurfoje denove, kaj subite eblis kompreni el la cirkonstancoj: ekzemple "ol", kiu signifis "truo" (svede "hål"), kaj "plep".

Tiu ĉi infano havis poste periodon, dum kiu ĝi eklernis amason da novaj vortoj kaj ekuzis pli kaj pli da duvortaj frazoj. "Sed ĝi lernas nur svedajn vortojn!" diris iun tagon ĉagrene la patrino. "Tute kontraŭe, nur esperantajn", diris la patro. Ekde tiam la infano diferencis inter la du lingvoj, kvankam ne sen eraroj.

Eblas pensi, ke je tiu periodo la infano pli konscie kolektis vortojn kaj ne nur nociojn por sia propra memoro.

Fine restas kompreneble la demando de gramatika evoluo de infano, kiu havas esperanton kiel duan gepatran lingvon: ĉu la reguleco de la gramatiko influas tiom, ke ĝi pli frue parolos senerare ol kutime infanoj faras en aliaj lingvoj?

Estus ja facile kompari la du lingvojn ĉe la sama infano, sed ne nepre la evoluo okazas paralele en la du lingvoj. Tiu ĉi infano ekuzis la svedan vorton "jag" pri si mem en la sveda multe pli frue ol la esperantan vorton "mi".

Ulla Luin

## Ne nur leteroj de plum-amikoj (7)

Aperis en esperanto multaj malgrandaj, pluraj vere grandaj, antologioj el naciaj literaturoj, aŭ foje el diversaj naciaj literaturoj en unu volumo. La unua el proksimume dudek antologioj el ununaciaj literaturoj estis la ankoraŭ leginda *Pola antologio* de 1906. Du gravaj pioniraj antologioj ĉerpantaj el multaj literaturoj estis redaktitaj de la nelacigebla Grabowski: *La liro*



de la esperantistoj (1893) kaj *El parnaso de popoloj* (1913); la dua havis tradukojn el tridek lingvoj. Pluraj el la fruaj poemtradukoj, ankoraŭ plejparte legindaj, estas nun plej facile troveblaj en la *Fundamenta krestomatio*. Rimarkindaj estas tie, inter aliaj, pluraj tradukoj de Zamenhof mem kaj la unua kanto de la *Iliado* en traduko de A. Kofman.

Inter la grandskalaj naciaj antologioj estas *Sveda antologio*, duvoluma; *Sveda poemaro* kaj *Sveda novelaro*; *Svisa antologio*; *Dana antologio*; *Ĉeĥoslovaka antologio*; *Kataluna antologio*. Du grandskalaj antologioj, kiuj vere estas elstaraj artverkaroj, estas *Hungara antologio* (1933), kies tradukintoj estis spertaj verkistoj de la budapeŝta skolo,

kaj *Angla antologio I*, kies tradukintoj estis anoj de la skota skolo aŭ pli-malpli proksimaj al ĝi. Estas vere malĝojige, ke precipe pro financaj malhelpoj — parte ĉar *Angla antologio* ne disvendigis sufiĉe — la delonge preskaŭ preta dua volumo, kiu enhavas brilajn tradukojn de, ekzemple, Byron, ankoraŭ ne eldoniĝis. La plej valora diversnacia antologio estas kredeble ankoraŭ *Eterna bukedo* (1931), en kiu nur unu homo, la unika Kalocsay, prezentis siajn tradukojn el grandaj poemoj el 23 lingvoj: angla, bengala, bulgara, ĉeĥa, ĉina, egipta, estona, finna, franca, germana, hebrea, helena, hispana, hungara, itala, japana, latina, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa kaj sveda! Ĉiujn tiujn lingvojn eĉ Kalocsay ne scipovis. Almenaŭ por la neeŭropaj lingvoj li uzis pontajn tradukojn, sed ĉiam, kiam eble, li uzis originalan tekston. Kie mi kompetentas por kontroli liajn tradukojn, mi miregas pri la mikso de fidelaj ekvivalentoj kaj nova poezia memsufiĉo. *Eterna bukedo* restis dum jaroj la libro, kiun mi plej ofte utiligis por montri al kleraj pridemandantoj, kion kapablas esperanto en la manoj de majstro.

Kalocsay mortis postlasante grandan parton de sia kolosa projekto, *Tutmonda sonoro*, kvinvoluma antologio el la tutmonda literaturo. Specimenoj aperis jam en diversaj gazetoj. *Tutmonda sonoro* aperos ĉiaŭtune en Budapeŝto.

Neeldonitaj restas multaj bonaj tradukoj el dramoj: iu tradukis gravan dramon por grava prezentado, ekzemple ĉe Universala Kongreso. La prezentado sukcesis, sed la traduko ne presigis. Inter tiaj valoraj sed ne sufiĉe konataj tradukoj troviĝas — nur ekzemple — *Friponaĵoj de Skapeno* (Molière); *Pigmaliono* (G. B. Shaw); *La homa voĉo* (Cocteau); *La leciono* (Ionesco); *La morto de lia ekscelenco* (Matković); *Homo kun la floro enbuŝe* (Pirandello); *Komedio*

de eraroj (Shakespeare); *Kataki* (S. Wincelberg). Ke diversaj verkistoj volonte tradukis tiajn dramojn, nur por kelkaj prezentadoj kaj sen promeso pri eldonado, vere atestas tre noblan sindediĉon. Tamen multaj el tiuj prezentadoj estis neforgeseble imponaj, tiel ke oni tute forgesis, ke temas pri traduko.

Estas neeble prepari tute kontentigan liston de rekomendindaj tradukitaj verkoj, ĉar kriterioj ofte kontraŭas unu la alian: unu leganto deziras havi la plej brilajn tradukojn, alia la plej gravajn verkojn; unu deziras esplori la taŭgecon de esperanto per detala komparado de traduko kun amata, bone konata verko en lia nacia lingvo; alia deziras ĉefe legi ion tradukitan, kion li tute ne kapablas legi en la originala lingvo; unu deziras legi nur altkulturajn majstroverkojn; alia deziras nur malpezajn aŭ almenaŭ simplajn verketojn, kiuj distros lin post laciga labortago. Preskaŭ ĉiu facile trovas ion laŭ sia gusto inter la librolistoj de esperantaj librovendejoj.


Mi tamen opinias, ke estas bone listigi tie ĉi nur kelkajn elektitajn tradukitajn verkojn, kiuj estas samtempe tradukoj kompetentaj aŭ pli ol nur kompetentaj, kaj el verkoj, kiuj laŭ sufiĉe ĝenerala interkonsento estas mem kulture altvaloraj. Mi volas emfazi, ke tiu ĉi listo estas afero de persona, eble iasence kaprica, elektado kaj alia literaturamanto eble preparus tre malsimilan liston simile atentindan.

La fizike plej bela libro havebla en esperanto estas *La dia komedio* de Dante, eldonita en Milano en 1963: librego 709-paĝa, pli ol du-kilograma, belege bindita kaj presita, kaj kun multaj ilustraĵoj de Botticelli; libro por tiu libroamanto, kiu trovas specon de volupto ĉe vere luksa libro, sed libro ankaŭ por rigorema fakulo, ĉar ĝi enhavas tutan aparaton por profunda studado. La itala originalo kaj la esperanta traduko de Giovanni Peterlongo estas paralele presitaj. Peterlongo ne redonas la tre malfacilan tercinan formon de Dante, sed alie la traduko estas tre laŭdinda, laŭ estimindaj beletristoj.

Alia grava traduko de Dante estas *Infero* de Kalocsay kiu majstre uzas tercinojn. Ĝi estis

siatempe epokfara traduko en esperanton kaj estas denove havebla pro ĵusa represo.

Ekzistas tradukoj de Ŝekspiraj dramoj malbonaj, mezbonaj kaj brile ravaj. En la lastan kategorion mi senhezite metos: *Otelo* en la traduko de Reto Rossetti; *Reĝo Lear*, *Somermeznokta sonĝo* kaj *La tempesto* en la tradukoj de Kalocsay. Tie oni trovas ekvivalentojn ofte de tiu speco, ĉe kiu ege penoplena kaj memkritikema elpensado finfine liveras ion, kio estas tiel absolute trafa, ke ĝi aspektas facila — al la leganto. Kalocsay kaj Rossetti apartenas al tiu malgranda aro da tradukistoj, kiuj, kiam ili trovas frazon tute ne tradukeblan, traserĉas sian tutan lingvan ila-



ron ĝis ili trovas la ĝustan neeban tradukon; kaj ili samtempe montras, kion kapablas esperanto, se oni eluzas ĝiajn eblojn.

Aperis en 1977 tre bona traduko de *Epifanio* (angle *Twelfth night*, komedio, kies abundaj vortludoj prezentas apartan problemon por tradukisto) de William Auld, kaj en 1980 simila eminenta traduko de *Rikardo Tria* de John Francis.

*Hamleto* estas havebla en du tradukoj! La traduko de Zamenhof aperis jam en 1894. Ĝi estas tre inteligenta, la versoj fluas, ĝi bone kaptas la sencon kaj multajn stilaĵojn. Zamenhof tamen ne adekvate por tia tasko konis la anglan kaj helpis sin per ia ne tro fidinda traduko aŭ eble tradukoj, do lia traduko estas multloke kritikinda. Sed, kiel taksis ĝin

Waringhien, "ĝi estas belstila kaj ĝi estas scenotaŭga". Ĉiokaze, traduki malfacilan, enigmoplenan, filozofiecan dramon majstroverkon en lingvon nur sepjaraĝan, tiel ke la traduko finfine estas ne nur belstila kaj scenotaŭga, sed tute rekonebla kiel esence *Hamleto*, eĉ se kelkaj mistraduketoj makulas ĝin, estis atingo, kredeble nur ĉar ĝi okazis. La dua tradukisto, L. M. Newell, havis du grandajn avantaĝojn: li estis anglo, kaj klera anglo, kiu fake studadis la anglan literaturon. Li tradukis inter 1959 kaj 1962, kiam esperanto estis multe pli matura kiel literatura lingvo, kaj li havis antaŭ si la kriteriojn, kiujn starigis jam gravaj tradukoj de ne nur Zamenhof, sed Kalocsay, Grabowski kaj aliaj. Ne estas mirinde, ke la traduko de Newell estas pli lingve verva, pli fidela al la angla teksto, ofte pli poezia. Atentema studado de la du tradukoj paralele mirigus iun ajn inteligentan leganton kredeble pri tri neklaregeblaj fenomenoj: la genio de Sekspiro mem; la genio kaj kuraĝo kaj artisma konscienco de Zamenhof; kaj la altnivelo de la nova atingo de Newell. Tiu sama leganto, post tia studado, multe pli bone scipovus esperanton kaj komprenus ĝiajn esprimrimedojn. Mi mem tamen ne metus la tradukon de Newell sur la saman nivelon kiel tiujn de Kalocsay kaj Rossetti.

Rossetti ankaŭ montris sian elstaran traduktalenton ne nur en partoj de *Angla antologio 1*, sed en *Robert Burns: Poemoj, kantoj kaj satiroj*, kie li kaj William Auld redonas perfekte la malfacilegajn strofoformojn de la skota poeto, multajn brilajn ekvivalentojn, kaj la saman vivoplenan paroleblecon, kiu tiel nin ravas ĉe la originalaj poemoj; kaj en traduko de la farsa operoteksto de W. S. Gilbert, *La piratoj de Penzanco*.

Tute elstara, kaj laŭ mia opinio unu el la plej-magnete interesaj kaj impone altnivelaj poeziaj verkoj en esperanto estas *Aniara*, traduko, kiun faris William Auld kaj Bertil Nilsson el la tremiga majstroverko de Harry Martinson. Tiun gravan poemon mi legis en la esperanta kaj angla tradukoj — kaj la esperanta versio ŝajnas al mi la pli bela kaj potenca. Tiu volumo estas ankaŭ unu el niaj plej bele presitaj

libroj, sed ĝi estas nur por tiuj, kiuj kun plezuro legas poezion avangardan kaj kompleksan.

Relative malmultaj homoj, kaj mi ne estas inter ili, kapablas juĝi la trafecon de la tradukoj el la hungara, kiujn faris Kalocsay; sed liaj multaj tradukoj el poemoj de Petöfi, kaj el *La tragedio de la homo* de Imre Madách, estas tre legindaj kaj memsufiĉaj artverkoj.

Mi devus simile verdikti pri komika majstroverketo *La bapto de caro Vladimiro* de K. H. Borovský, verko, kiun tradukis el la ĉeĥa Tomaš Pumpr. Verve svingiĝas mallongaj, tre ŝpareme kunmetitaj versoj, trompe simplaĵaj, tre enhavoriĉaj. Devis esti terure malfacile traduki ion tian. Kelkaj legantoj eble ŝokiĝus pro ne tro respektplenaj aludoj al religiaj aferoj, sed la poemo estas ne atako kontraŭ sincera religia fido, sed kontraŭ despotismo, obskurantismo kaj ekleziaj dubindaĵoj.


Kalocsay kaj Waringhien kunlaboradis pri du elstaraj verkoj, grandskalaj, ege legindaj, siaspece eble perfektaj: *La floroj de l'malbono* de Charles Baudelaire kaj *Kantoj kaj romanoj* de Heinrich Heine. Waringhien faris sola aliajn tre bonajn tradukojn el la franca; kaj Roger Bernard faris elstarajn tradukojn de Sartre (*La naŭzo*, *La respektinda p.*, *Sen eliro*) kaj de Pagnol (*Topaze*).

Restas legindaj la ĉefaj traduko de Zamehof: *Georgo Dandin* (Molière) el la franca, *La revizoro* (Gogol) el la rusa, *Ifigenio en Taŭrido* (Goethe) kaj *La rabistoj* (Schiller) el la germana; la nobla pionira romano pri virinaj rajtoj, *Marta* (Eliza Orzeszkowa) el la pola; kaj la *Fabeloj* de H.C. Andersen. La esperanta *Biblio* estas kompreneble grava verko kaj la *Malnova testamento* estas tradukita de Zamenhof mem. Zamenhof verŝajne mortigis sin grandparte per kvazaŭ superhoma trolaborado, sed malmultaj homoj postlasas tiom da valoraj laborfruktoj.

La *Biblio* estas centra libro de okcidenta kulturo. *La nobla korano*, centra libro de la araba kulturo kaj la islama mondo, estas nun ankaŭ havebla en esperanta traduko de Italo Chiussi. Ĝi flue legiĝas, sed mi ne kompetentas juĝi la nivelon de la tradukarto.

Ĝis nun ekzistas multe pli da tradukoj el eŭropaj ol el aliaj lingvoj, sed nuntempe plimultiĝas tradukoj el la japana. Bona specimeno estas *Kvin virinoj de amoro* de Ihara Saikaku, kiun tradukis unu el la plej aktivaj japanaj verkistoj esperantaj, Miyamoto Masao.

La gravegaj kulturoj helena kaj latina restas nesufiĉe reprezentitaj en esperanto; sed valoraj estas *Antigona* kaj *Reĝo Edipo* de Sofoklo en la tradukoj de D. B. Gregor, kaj *Bakĥantinoj* de Eŭripido en la traduko de Albert Goodheir. Multaj tradukoj de Kalocsay restas nepresitaj aŭ presitaj nur en gazetoj, sed kelkaj belegaj tradukoj el ambaŭ lingvoj troviĝas en *Eterna bukedo*. La plej grandskala ĝisnuna



traduko el la latina estas la *Eneido* de Virgilio, en traduko de Valienne. Ĝi aperis en 1906 kaj restas leginda kaj multrilate estiminda, kvankam laŭ la pli rigoraj kriterioj de la nuntempo ĝi estas ankaŭ multrilate kritikinda.

Svedoj eble deziras komencisian studadon pri tradukitaj verkoj en esperanto per kelkaj tradukoj bonaj el gravaj svedaj verkoj. Stellan Engholm tradukis tri verkojn de Selma Lagerlöf: *La mono de sinjoro Arne*, *Gösta Berling* kaj *La ringo de la generalo*; ankaŭ aliaj verkoj ŝiaj aperis en esperanto. Engholm tradukis ankaŭ *Pasko* de Strindberg, de kiu aperis jam ankaŭ *Fraŭlino Julie*, *Pario*, *Insulo de la feliĉuloj* kaj *La konscienco riproĉas*. La tri verkoj *Sveda antologio*, *Sveda novelaro* kaj *Sveda poemaro*

kovras grandan kaj varian teron.

Ĉio, kion mi supre menciis, estas nur eta komenco pri la tradukita literaturo esperanta. La tereno estas jam tiel vasta, ke nur enciklopedia verko povus adekvate pritrakti ĝin. Mi volas emfazi konklude pri du konceptoj: esperanto jam montris sin tute taŭga, en la manoj de sentemaj kaj konsciencaj tradukistoj, por redoni ĉion iel redoneblan en alia lingvo, de altvalora literatura verko, eĉ kiam la valoro troviĝas grandparte en vortmuziko, vortunuoj, stilaj komplikaj kaj subtilaĵoj, kiuj prezentas grandajn problemojn al tradukisto. Kaj esperanto estas la sola lingvo, kiu donas al ĉiuj naciaj (kaj minoritataj) lingvojiasence egalajn rajtojn por tradukado. Kredeble estas ne nur koincido, ke tiel multaj verkoj jam aperis, tradukitaj el kelkaj lingvoj, kies anoj spertis lingvan imperiismon: la hungara, kataluna, la jugoslavaj lingvoj, la pola, la estona. La tradukisto bezonas nur sian propran lingvon kaj esperanton — kvankam ambaŭ tiujn li konu tre bone. Paralele, esperanto demokratiigas la kulturon sen forlaso de kriterioj: homoj, kiuj neniam havos tempon aŭ okazon por lerni plurajn grandajn kulturlingvojn, povas per esperanto jam konatiĝi kun vastaj perspektivoj de la monda kulturo. Mi ankorau kun kortuŝo memoras pri amiko mia, portugala ŝarĝaŭto-kondukisto, kiu mortis longe antaŭ la falo de la portugala dekstra diktaturo. Li vizitadis la lernejon nur ĝis la dektria jaro, li estis mizere malriĉa, kaj iam suspektemaj policanoj konfiskis ĉiujn malmultajn librojn, kiujn li ame kaj ofere akumulis en sia aĉa eta loĝejo. Li ofte malsatis. Frostoj vintraj turmentis lin per tusado kaj pernioj. Kiel tia homo povus esperi, ke io nutros lian intelekton, varmigos lian spiriton? Sed esperanton li lernis, kvankam li devis lerni kaŝe; kaj mi memoras, kiel avide li ricevis, kiel entuziasme li pridiskutis letere, senditajn esperantaj tradukojn el Ŝekspiro, Baudelaire, Sofoklo kaj aliaj. Por tiaj homoj esperanto ne estas unu el la fenestroj al la mondo; ĝi povas esti la sola fenestro. Des pli grava estas la laboro de la tradukisto, kaj des pli dankinda. (daŭrigota)



## Teaterturné i Norden

Den polska skådespelerskan Jadwiga Gibczyńska har under en två månader lång turné besökt en rad platser i Norge och Sverige, där hon presenterade, på esperanto, olika enmansdramer: om Marie Curie, om Zamenhof och andra.

Sina framträdanden gjorde hon till esperantotalande publik, men även till elever i olika svenska skolor, som följde hennes esperantoteater efter en kort introduktion om innehållet.

## Nyutgåvor av Zamenhof

Zamenhofs samlade originalverk är under utgivning i Japan. Tio volymer räknar serien hittills (nio ordinarie och en *bis*); ytterligare tre *bis*-volymer är planerade och med dessa skulle serien vara avslutad.

Seriens förläggare, Itô Kanzi, planerar en serie till, vilken skulle innehålla Zamenhofs översättningar.

Itô Kanzi har också författat en mastodontisk biografisk roman över Zamenhof på japanska, i åtta band, på sammanlagt 5259 sidor.

## Esperanto främjar freden

Kampanjen för världsavrustning, startad av två brittiska riksdagsmän, Fenner Brockway och Philip Noel-Baker, anger i sin broschyr över fredsfrämjande aktiviteter också esperanto. Båda riksdagsmännen är med i den brittiska parlamentsgruppen som stöder esperanto.

## KORT & GOTT

**SVERIGE.** Talman Ingemund Bengtsson upprepade i programmet "Kafé 18" sin tro på esperantos möjligheter, den 7 oktober.

Den 18 december hade P3 ett program om esperanto, gjort av esperantoföreningen i Malmö inom ramen för "bandverkstan".

**BULGARIEN.** Esperanto är enligt det nya läroplanet fakultativt ämne i varje 9e klass.

**RUMÄNIEN.** Universitetet i Bukarest har givit ut en 385 sidor tjock esperantisk-rumänsk brobok.

**NYA ZEELAND.** N-Z Esperantoförbundet kommer att ha sin 47e kongress i Christchurch, 6 - 10 januari.

**NEDERLÄNDERNA.** I en poesiantologi med utländska diktare översatta till holländska, "Zeg, luister eens", finns fyra esperantodiktare med: Kalocsay, Auld, Ragnarsson och De Kock. Dikterna är översatta av W.A. Verloren van Themaat.

Ĉu vi biciklas? Nu ja, eble iom sperte aŭ por amuzo. Sed certe vi ne jam biciklis de Francio al Vladivostoko, tra Japanio kaj Ĉinio. Tiun mirigan vojaĝon tamen faris homo, tiam juna: Lucien Peraire, franca esperantisto, dum la 20-aj jaroj bicikladis tra Eŭrazio. Ekde januaro 1982 li rakontas pri la amasaj aventuroj kaj travivaĵoj, spertoj kaj mirigaĵoj de sia vojaĝo.

### BICIKLE TRA EŬRAZIO

en nova artikolserio en MONATO. Ne maltrafu ĉi tiun streĉan, interesan, instruciĉan kaj foje ankaŭ amuzan legaĵon! Tuj abonu ...



40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajejoj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 155 skr, pagebla al la poŝtĝiro 59 67 68-2, Esperantoförlagets prenumerationskonto. Abonu tuj kaj ne malhavu ĉi tiun interesan kaj legoriĉan magazinon.